

[Esperanto below]



Universala Esperanto-Asocio

**A Message from the Universal Esperanto Association:  
The Esperanto community celebrates voices of Indigenous  
peoples on the International Day of Indigenous Peoples,  
August 9, 2020**

The Universal Esperanto Association again gave special attention to the International Day of Indigenous Peoples on August 9, 2020. Esperanto speakers around the world were invited to learn more about the history, contributions and current struggles of Indigenous peoples through a series of talks, films and publications hosted virtually by the World Esperanto Festival, MondaFest' 2020: <https://eventaservo.org/e/indighenaj-popoloj-2020>.

Among the contributions were a welcome message by Georges Sioui, a historian with the Huron-Wendat Nation (Canada), and a number of subtitled short films by up-and-coming young Indigenous directors under the auspices of the Canadian National Film Board. The city of Montreal, Canada, had been scheduled to host this year's World Esperanto Congress until the Covid-19 pandemic forced its postponement to the year 2022. The Congress was to have had a significant focus on Indigenous themes. It is hoped that this focus will now be central to the 2022 event, taking place in the year of the launch of the International Decade of Indigenous Languages.

Also highlighted was a recent issue in Esperanto of UNESCO's flagship publication, *UNESCO Courier*, devoted to Indigenous languages. Esperanto is now among the languages in which the *Courier* regularly appears.

The Esperanto movement was active in celebrating the International Year of Indigenous Languages in 2019. As an organization committed to multilingualism and the preservation of linguistic diversity, the Universal Esperanto Association promotes the use of the International Language Esperanto for international communication.



Universala Esperanto-Asocio

## **Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio: La Esperanto-komunumo festis la voĉojn de Indiĝenaj popoloj okaze de la Internacia Tago de Indiĝenaj Popoloj, 9 aŭgusto 2020**

Universala Esperanto-Asocio denove dediĉis specialan atenton al la Internacia Tago de Indiĝenaj Popoloj la 9-an de aŭgusto 2020. Esperanto-parolantoj el la tuta mondo estis invitataj pli multon lerni pri la historio, kontribuoj kaj nunaj luktoj de indiĝenaj popoloj per serio de paroladoj, filmoj kaj eldonaĵoj prezentitaj de la virtuala Monda Esperanto-Festivalo, MondaFest' 2020: <https://eventaservo.org/e/indighenaj-popoloj-2020>.

Inter la kontribuaĵoj estis bonveniga mesaĝo de Georges Sioui, historiisto ĉe la nacio hurona-ŭendata (Kanado), kaj pluraj subtitolitaj mallongaj filmoj de nove aperantaj junaj indiĝenaj reĝisoroj sub aŭspicio de la Kanada Nacia Filma Komitato. La urbo Montrealo, Kanado, devus gastigi la ĉi-jaran Universalan Kongreson de Esperanto, sed la pandemio Kovim-19 necesigis ĝian prokraston ĝis la jaro 2022. Oni intencis, ke la Kongreso signife fokusiĝu je indiĝenaj temoj. Oni esperas, ke tiu fokuso estu nun centra elemento de la kongreso de 2022, la jaro de lanĉo de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj.

Ankaŭ aparte emfazita estis lastatempa numero de la ĉefa revuo de UNESKO, la *Kuriero de UNESKO*, kiu pritraktis indiĝenajn lingvojn. Esperanto estas nun inter la lingvoj en kiuj la *Kuriero* regule aperas.

La Esperanto-movado aktive festis la Internacian Jaron de Indiĝenaj Lingvoj en 2019. Kiel organizo dediĉita al multlingvismo kaj la konservado de lingva diverseco, Universala Esperanto-Asocio subtenas la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto por internacia komunikado.

---

**Universal Esperanto Association Office for Liaison with the United Nations, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. [www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org).**